Norvega Esperantista Ligo

# Jarraporto 2025

Aprobota dum la landa kunveno la 4-an de junio 2026.

## Ekstera informado

Ni havas retpaĝaron www.esperanto.no, kiun prizorgas Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelie Abrahamsen. Ĝi enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, sed ne estas ofte ĝisdatigita. Komenciĝis parta renovigado, kiu pludaŭros en 2026. NEL ankaŭ havas konton en Facebook, kie aperis kelkaj mesaĝoj, ĉefe ligitaj al kursoj.

## Instruado

NEL aranĝis printempe retan kurson per Zoom, entute kvar kursvesperojn. Estis kvar partoprenantoj. Tra la jaro kunvenis preskaŭ ĉiusemajne grupo da kvin progresantoj. Instruis Marianne Lund.

## Kontakto kun la kluboj kaj la membroj

La landa kunveno okazis rete la 5-an de junio. Krom la ordinaraj programeroj, prelegis Kjell Heggvold Ullestad sub la titolo “La nazioj kaj NEL”.

La 2-an de julio, NEL-estraranoj organizis kunvenon por kursanoj kaj junaj membroj en Oslo.

Eldoniĝis kvar numeroj de Norvega Esperantisto. Redaktis Claude Rouget. La redaktoro provis variigi la enhavon kaj ricevis pozitivajn reagojn de la legantoj.

La norveglingva retpoŝta informilo Esperanto-nytt eldoniĝis ok-foje dum la jaro. La informilon ricevas membroj kaj aliaj interesatoj. Redaktis Bård Hekland.

Informoj dissendiĝis ankaŭ per la retpoŝta listo NEL-inform, kiun administras Jardar E. Abrahamsen. La estraraj protokoloj estis afiŝitaj en niaj retpaĝoj.

## Administrado

Grava novaĵo estas, ke la antaŭa parto de la asocia oficejo Esperantonia en Oslo ekde marto estas forluata al kvar verkistinoj, ekde septembro sub longtempa kontrakto. La luantoj multe ordigis, kaj la tuta ejo estis ankaŭ profesie purigita. En julio, Marianne Lund, Claude Rouget kaj Bård Hekland pasigis kvin tagojn ordigante en la ejo. Post tio, ĝi estas bone utiligebla, kvankam daŭre restas farotaĵoj. Necesas i.a. riparoj de fenestroj kaj plibonigoj de la elektra sistemo, sed tiuj okazos en 2026. Estis ankaŭ aĉetitaj kelkaj novaj (parte brokantaj) mebloj. La malnova komputilo apenaŭ plu funkciis. Herman Ranes faris sekurecan kopion, kaj ni decidis ne plu havi konstantan komputilon en la oficejo.

La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazas rete. Okazis 8 retaj estraraj interkonsiliĝoj.

En 2025, NEL havis 3 aktivajn aliĝintajn klubojn: Oslo (30 membroj), Tromsø (8 membroj) kaj Trondheim (10 membroj). Estas ankaŭ ioma aktivado en Rogaland kaj la reta preskaŭ ĉiusemajna kunvenrondo gvidata de Marianne Lund. La suma membronombro estis 92. El tiuj, 12 estis sub 35-jaraĝaj kaj 21 dumvivaj membroj. Ni havas 2 honorajn membrojn, Otto Prytz kaj Douglas Draper.

Ne estis aktivado kadre de Norvega Junularo Esperantista.

La ordinaraj enspezoj en 2025 (123 661 NOK) iom superas la elspezojn (116 756 NOK), inter alie pro luigado de Esperantonia ekde septembro 2025 kaj nova dumviva membro. La ĉefaj kostoj koncernas Esperantonian kaj la revuon Norvega Esperantisto.

Legaco Rolf Uhlen disdonis kvar subvenciojn en 2025, ĉiujn al NEL por kovri kostojn de kolora Norvega Esperantisto, kursanoncojn, agadon dum Operasjon Dagsverk kaj renovigadon de Esperantonia, entute 59 073 kronojn. Je la fino de la jaro, ĝia kapitalo estis 1 034 649 kronoj. La legacan estraron konsistigis Herman Ranes (prezidanto), Judith P. Abrahamsen (kasisto), Ulf Lunde (estrarano), Bård Hekland kaj Leif Arne Storset (anstataŭantoj).

La estraron de NEL ĝis la landa kunveno konsistigis Bård Hekland (prezidanto), Jardar E. Abrahamsen (vicprezidanto), Marianne Lund (sekretario), Claude Rouget (kasisto) kaj Lars Sandbakk (estrarano). En la landa kunveno ĉiuj reelektiĝis al la samaj postenoj, aldoniĝis Harald Rygg kiel anstataŭanto.

## Resumo

En 2025, la grava novaĵo estas, ke ni sukcesis parte luigi Esperantonian al konstantaj eksteraj uzantoj, kiuj tre harmonie kun-utiligas la ejon kun ni. NEL retenas la stokejon kaj la malantaŭan oficejon, dum la antaŭa ĉambro estas disponebla por la luantoj dumtage. Tio ĉi certigas enspezojn kaj konstantan utiligadon de la ejo, kiu alie estus nur malofte uzanta krom por stokado.

Alia pozitiva novaĵo estis iniciato de Lars Sandbakk por konatigi skandinavajn aktivulojn. Okazis du retaj kunvenoj en la aŭtuno, kaj tiuj daŭros en 2026. Krome, ni fieras pri nia altkvalita asocia revuo Norvega Esperantisto, kiu ankaŭ en 2025 eldoniĝis kvarfoje, kaj nia retpoŝta informilo Esperanto-nytt akurate aperis ok-foje kiel planite.

En 2026, grava projekto estos renovigo de nia malmoderniĝinta retejo (kaj teĥnike, kaj enhave). Ni ankaŭ provos atingi pli vastan legantaron por Esperanto-nytt. Novaj aktivuloj (aŭ iamaj) estas bonvenaj aktiviĝi!

La 23-an de aprilo 2026

La liga estraro

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen

Marianne Lund, Claude Rouget, Lars Sandbakk, Harald Rygg